



**6(160)
2016**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Edwin de Kock (Sudafriko)

Kvar sezonoj de la koro

I. Somera Nokto

Mi dormeme kuŝas lite,
kvazaŭ fiŝ' en blanka sonĝo,
de la luno dorlotite
ĝis la transtegmenta plonĝo
lantsubite glutis ĝin.
Mi nun aŭskultas la tenebron,
kaj ĉiu plankoknar' aŭ pin'
eĥigas plaŭdan sangofebzon.
La koro horojn fortamburas,
ritmas kvazaŭ mar' sur rokoj.
Pensoj sur la bordo kuras,
brue, kun mortantaj vokoj.
Min pertubas tiu vasto
batanta en la popra sin' –
la kosmo kvazaŭ mia gasto –
ĝis la dormoflus' forportas min.

II. Aŭtuna Posttagmezo

Foliolange
arboj flustras,
korosange
karno flustras
pri la aŭtuno.
Kalviĝas arboj
antaŭvente.
Mi kalviĝas
mortosente,
malgraŭ la suno.
Atendi torturas
dum sablo de l' nuno

Cztery sezony serca

I. Letnia Noc

Senny leżę w łóżku,
niby ryba w białym śnie,
pieszczony przez księżyc
aż do zanurkowania w dachu,
który powoli nagle go połknął.
Teraz słucham ciemności a każde
skrzypnięcie podłogi lub sosny wywołuje
echo w chlupoczącej gorączce krwi.
Serce wybija dalekie godziny
w rytmie jakby morza na skałach.
Myśli biegną po brzegu
hałaśliwie, z zamierającym wołaniem.
Paraliżuje mnie ta przestrzeń
bijąca we własnym łonie –
kosmos niczym mój gość –
aż do przyływu snu mnie przenosi.

II. Jesienne Popołudnie

Językami liści
szepczą drzewa,
krwią serca
szepcze ciało
o jesieni.
Łysieją drzewa
z powodu wiatru.
Łysieję
w przeczuciu śmierci,
mimo słońca.
Oczekiwanie jest torturą
w piasku terazniejszości

pretersusuras,
malgraŭ la suno.

III. Vintra Mateno

La vintrobesto glacispire
stratojn kaj en kortoj snufas,
levante paperbulojn gire;
for galope eke hufas
trans kampojn de la frosta koro,
el kiu frapas ĝi martele
ĝemojn de la tempdoloro
duriĝanta sendegele.

IV. Primavera

Miaj verdaj printempensoj
freŝe ekfolias
sub liutaj ventkadencoj.
Voĉoj en mi krias,
arĝentarpeĝoj de la koro,
ke konvolucias
en ĉiu tigo de la sensoj,
post la jaroj sen odoro,
jubilonata flava floro.

szepcze w przelocie
mimo słońca.

III. Zimowy Poranek

Zwierzę zimy lodowym oddechem
po ulicach i podwórkach węszy
unosząc wirujące szczątki papieru;
galopując w dal kopytami przemierza
pola zamarzniętego serca,
z którego uderzając młotem wydobywa
skargi bólu czasu
twardniejącego bez odwilży.

IV. Wiosną

Moje zielone, wiosenne myśli
świeżo dostały liści
pod kadencjami lutni wiatru.
Krzyczą we mnie głosy
srebrnymi arpeggiami serca,
że zbiera
w każdej łodydze zmysłów,
po latach bez zapachu,
radosny żółty kwiat.

tradukis polen *Lidia Ligeza*

EDWIN DE KOCK (*1930), sudafricano, esperantisto de 1955 j., lektoro, redaktoro de „Afrika Esperantisto” 1956-57. Li verkis angle kaj afrikane, ellaboris teorion pri la mertiko. Esperantaj verkoj: „Ombroj de la kvara dimensio” (poemoj, 1961), „Fajro sur mia lango” (poemoj, 1967), „Poemaro kaj prozeroj” (1970), „Kvin elementoj” (poemaro, 1970)

Lidia Ligeza

La hejma kuraco

Mi estis tri jaraĝa kaj kun malfeliĉa mieno kuŝis en liteto. Doloris min la gorgo, la panjo ien foriris, enuis min jam la ilustrita libreto pri kornikoj, kiun laŭte legis al mi la paĉjo. Subite li decidis kaj kuraci kaj konsoli min. Alportita al mi glaseto de tokajo okazis tre bongusta por infano, ĉar ĝi estis speco dolĉa. Pro mia videbla entuziasmo la malavara patro donis al mi la duan glaseton.

Kiam revenis la patrino, la infano estis tute malrigida kaj senkontakta. La paĉjo memkompreneble ne informis ŝin pri sia karitata agado. La timigita panjo tuj alvokis la loĝantan feliĉe unu etaĝon pli sube, kuraciston. Li, medicinista gardaĝelo de mia tuta infaneco, apogante la manojn sur konvekso ventro kaj ironie rigardante de sub sia ora binoklo diris: "Al ŝi estas nenio. Ŝi nur estas komplete ebria".

Pri tio, kion diris la panjo al la paĉjo post ĉi akcidento mutas la familiaj kronikoj. Kion ajn malagrablan ŝi dirus, la paĉjo ne meritas entutan kondamnon. Li estis freŝa patro ne entute orientiĝinta agi kun ne tute sana infano. Rolis ankaŭ bonkoreco kaj helpemo. Povis ankaŭ influi lin la amiko, kiu dum la tuta vivo kuracis sin laŭ jena recepto: je la koro kaj kapdoloro – konjako, je la stomako – amara brando aŭ vodko kun pipro, je la gorgo – dolĉaj vinoj kaj brandoj, kontraŭ malvarmumo – pura vodko, kontraŭ malfortiĝo – ĉiuj alkoholaĵoj.

Dum mia eduka procezo, en popollernejo kaj poste, kiam post grandega peno aŭ entute senrezulte mi povis finsolvi matematikan taskon – la panjo ŝate diradis: "Nenio stranga, via patro por ĉiam per tokajo difektis vian cerban, matematikan ĉelon".

Malgraŭ ĉio mi fieras: ne ĉiu povas komenci la veran vivon havante tri jarojn.

La **101-a Universala Kongreso de Esperanto** okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2016 en la urbo Nitra de okcidenta Slovakio. La kongresa temo estis **Socia justeco – lingva justeco**. Ĝi estis la unua Universala Kongreso en Slovakio. Certaj konsideras ĝin la dua pro la 13-a UK-o, kiu okazis en Prago, en la jaro 1921, kiam Prago estis ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio.

Miaj impresoj pri la 101-a z UK-o en Nitra

Ĉi jare la mezgranda slovaka urbo Nitra fariĝis la ĉefurbo de Esperantujo, al kiu alvenis preskaŭ 1200 samideanojn de dekoj da landoj. Dum la ekskursoj nur la profesiaj slovakaj gvidantoj bezonis esperantajn interpretistojn, ne ni, la plurlingvaj grupoj de esperantistoj. Dum unu semajno la Kongreso estis modelo de tio kiel la nuntempa mondo povus funkcii - sen la lingva problemo. Sed paradokse, la nuntempaj teranoj tamen preferas malsaĝan lingvan kaoson, ne la bonajn, elpruvitajn ideojn, kiel tiu de unu neŭtrala lingvo por ĉiuj. Dum la nitra Kongreso nia lingvo ankoraŭfoje pruvis ĝian facilan lerneblecon: la slovakaj servistinoj en la kongresa manĝejo jam post kelkaj tagoj sufiĉe bone majstris bazan Esperanton! En neniuj aliaj fremdaj lingvoj ja tio eblas.

La kongresanoj malkovris por si la multjarcentan historion de la originoj de Slava Kristanismo en la Centra Eŭropo, kies lulilo estis Nitra. Abundas tie antikvaj preĝejoj kaj sanktejoj. Bele intermontete situata urbo estis ideala por la Universala Kongreso. Dum la kongresa semajno ni estis videblaj. Ĝenerale tial UK-oj pli bone funkcias en malgrandaj urboj.

Multaj komunaj aranĝoj okazis publike, en la stratoj. La nacia kaj internacia spektakloj en la ĉefplaco allogis amason da lokaj nitranoj. Ili ankaŭ aplaudis la verdajn marŝantojn, kiuj kun vigla muziko kaj flagoj impone paradis tra la ĉefstratoj. Lokaj entreprenoj, kiel ekzemple la mielvinkeloj Tomka, mem metis flagojn kaj E-afiŝojn sur siajn pordojn. Sur la frunto de la grandega Urba Teatro pendis giganta, certe la plej granda Esperanto afiŝo, kiun mi iam ajn vidis. En la urbocentro la stratoj estis esperante ornamitaj kaj abundis multkoloraj afiŝoj pri la kongreso. La urbestro regalis la kongresanojn per la impona akcepto en la urbodomo. La kongresanoj ĝuis senpagajn rajdojn en la urbaj aŭtobusoj.

La programo estis abunda kaj riĉa. Dumtage samtempe okazadis po kelkaj eventoj en diversaj salonoj. Ne eblis partopreni en ĉiuj. Eĉ teatraj prezentadoj en la Urba Teatro okazadis samtempe en diversaj lokoj. Furoris mia malnova amiko Jerzy Handzlik, kiu denove ludis la propran spektaklon "Dr-o Zamenhof", ĉi-foje en la bele renovigita urba sinagogo.

Dum la anonckunveno pri la rezultoj de la Belartaj Konkursoj okazis prezentado de la tradukita poezio. Re prezentantoj de 14 diversaj lingvoj legis esperantlingvajn tradukojn. Mi havis la okazon prezenti la poemon de la pola Nobel-premiitino Wisława Szymborska, kaj mi legis ŝian kortuŝan poemon "Kato en malplena loĝejo" tradukitan de mia multjara kunlaborantino Lidia Ligęza. Rusa esperantistino eĉ tiel ekkortuŝegis pro ĝi, ke ŝi ekploris, kaj tuj aĉetis la libron en la libroservo.

Mia alia kontribuo al la Kongreso estis miaj propraj fotoj de Chicago E-Societo kaj centro de Naperville, la urbo ĝemeligitaj kun Nitra. Tiuj fotoj aperis dum la Kongreso en la ekspozicio pri ĝemelurboj de Nitra.

En ĉiu programero partoprenis kelkdeko de la publiko, la tuta milo de kongresanoj estis disigitaj je multaj aliaj samtempaj eventoj en diversaj salonoj.

Dum la kongreso TEJO, la junulara branĉo de UEA fariĝis jure sendependa. Por ne emfazi iun skismon, oni strebis integriĝi la du ĉefajn grupojn de la kongresanoj: junulojn kun olduloj. Multaj aktivaj estis planitaj por ambaŭ. Sed ekzemple, dum la vespera pikniko nur la junuloj sidis sur la herbejo, dum la olduloj preferis sidi sur la najbara ŝtuparo. La divido okazis neplanite, sed estis neevitebla.

La ĉefa kongresa temo pri la justeco de lingvoj bone korespondis kun la loka lingva situacio. En la relative novbakita ŝtato de Slovakio tamen estas uzataj diversaj lingvoj: slovakaj, ĉeĥaj, kaj hungaraj, kvankam nur la slovakaj estas la oficialaj.

Ĝis la revido venontjare en Seulo, kaj en Lisbono en 2018 !

Leszek Kordylewski

Mia tria Universala Kongreso de ESPERANTO Nitra - Slovakio (23-30 julio 2016)

Ĉijare la 101-a UK-o okazis en Nitra (Slovakio). Mia kongresa numero estis 365.

Julie mi sukcese ricevis vizon por vojaĝi Ĉeĥion, invitita de la ĉeĥa amikino. Ŝia nomo estas Věra Koloničná el Frýdek-Místek. Ŝi invitis min 30 tagojn antaŭ la aranĝo kaj mi petis vizon en Havano. Feliĉe mi havis nenian problemon por ĝin ricevi.

Mi vojaĝis Eŭropon la 16-an de julio pere de Air Berlin kaj alvenis al Munkeno la 17-an posttagmeze. Tie akceptis min lokaj geesperantistoj, inter ili s-ro Uli, s-rino Sara Spano kaj s-ro Francesco Maurelli. Ili volonte kaj zorgeme helpis min rilate al biletaj aferoj por daŭrigi mian veturadon al Frýdek-Místek (Ĉeĥio). Mi alvenis al Frýdek-Místek lunde la 18-an je la 7-a matene kaj tie atendis min mia amikino Věra.

En Ĉeĥio mi vizitis la urbojn Bartošovická kaj Svitavy (urbo 760-jara) kie troviĝas la Esperanta Muzeo de Svitavy, tre riĉa, bonega kaj interesa muzeo rilate al la tiea historio de Esperanto. Mi restis 5 tagojn en Ĉeĥio kaj la 23-an je la 7-a matene ni veturis al Nitra por atingi la 101-a Universalan Kongreson de Esperanto.

La tria UK-o por mi estis bonega kaj belega, tre interesa kaj alloga. Riĉa kaj abunda programo ne mankis. La 23-an je la 19-a okazis la kutima movada foiro, kie geamikoj renkontiĝas kaj interŝanĝas interesitaĵojn. La 24-an de la 7-a ĝis la 10-a matene ni atendis la Solenan Inaŭguron, en la granda salono. En ĝi sidis ne angloj, francoj, rusoj kaj poloj, sed homoj kun homoj, fidelaj kaj fieraj geesperantistoj uzantaj nian belegan lingvon. Post kanti la Esperantan Himnon, je la 12-a, la 101-a UK-o estis oficiale inaŭgurita de la prezidanto de UEA.

La urbo Nitra estas tre bela. Mi promenis multe kaj vizitis multajn lokojn. La urbo estis bele ornamita per esperantaj flagoj. Merkrede, kiel kutime, okazis multaj diversdirektaj ekskursoj. Mi ekskursis al Bratislavo, ĉefurbo de Slovakio, kiu laŭ mia opinio estas belega kaj interese ga urbo. Ni vizitis kastelon de Bratislavo de kie oni povas ĝui la grandegan riveron Danubon. Ni ankaŭ vizitis la Danuban Muzeon pri Arto, kiu okazis ankaŭ belega kaj bonega.

Dum sep tagoj mi restis en Nitra kaj en la antaŭlasta tago okazis komuna fotado, dum kiu ĉiuj gesamideanoj faris aktualajn fotojn. Por disvastigi Esperanton okazis marŝado. Tiu marŝado estis unika, ĉar haltigis la trafikon kaj multaj neesperantistoj ankaŭ akompanis nin. Ĉiuj estis tre feliĉaj kaj fieraj portante la esperantajn flagojn, kantante kaj dancante dum la marŝado.

Sabaton, la 30-an okazis la Solena Fermo, en kiu jam ne ĉeestis multaj geesperantistoj, ĉar plimulto da ili devis reveni hejmen. Ankaŭ ĝi estis tre impona kaj ni sentis grandan gravecon de Esperanto por la tutmonda komunikado. Kantinte la Esperantan Himnon ĉiuj gesamideanoj feliĉe kaj ĝoje adiaŭis unu la alian, post bonega semajno en Esperantujo.

Guillermo Bes Salazar
esperanto@nauta.cu

Konstitucio de la ŝtato devas esti tia, por ke ĝi ne malfirmu konstitucion de la civitano.

Kiam la popolo ne povas voĉi, oni tion rekonas eĉ ĉe kantado de la himnoj.

La Maljustico ĉiam estas en la ĝustaj manoj.

Stanisław Jerzy Lec
Hirtaj pensoj (Myśli nieuczesane)